

# Informilo de Novembro 2016

Numero 25, novembro 2016

## Novjorka prelegserio omaĝos al Tivadar Soros, esperantisto

**30 oktobro 2016.** Esther Schor, aŭtoro de *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language* (Ponto el vortoj: Esperanto kaj la revo de Universala Lingvo. Metropolitan Books, 2016), estos la unua parolanto en prelegserio memoriga al Tivadar Soros, kies aŭtobiografia verko *Maskerado*, verkita en Esperanto, rakontis pri liaj sukcesaj streboj teni sian familion viva kaj kompleta dum la Nazia kulpelo kaj murdo de miloj da judoj en Hungario. Fine la familio almigris Usonon, kie lia filo, George Soros, elstariĝis en la mondo de financo kaj humana filantropio.

La prelegserio, subvenciata de Esperantic Studies Foundation, okazos sub aŭspicio de la Programo pri Lingvistiko ĉe la Postdiploma Centro de la Urba Universitato de Novjorko, 365 Kvina Avenuo (ĉe 34-a Strato). La prelego okazos en salono C198 vendredon, la 16-an de decembro, 2016, je la 4-a pm.

Kiel profesoro de la angla ĉe Universitato Princeton, Esther Schor studas la originojn kaj evoluon de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝian pozicion en la moderna mondo. Multilate, ŝia nova libro estas rekonfirmo de la graveco de Esperanto kiel socia movado en la hodiaŭa mondo. Laŭ recenzo en *New York Times*, la libro "lasas nin sen dubo ke, kion ajn Esperanto faras, ĝi ŝajne ĝuste faras ĝin."

Estontajn prelegojn prezentos Michael Gordin, profesoro pri la historio de scienco ĉe Universitato Princeton (pri ligo inter Albert Einstein kaj la internacilingva movado), Brigid O'Keeffe, profesoro pri historio ĉe Kolegio Brooklyn (pri Esperanto en la fruaj jaroj de Sovetunio), Ulrich Lins, historiisto kaj aŭtoro (pri persekutado de esperantistoj sub Hitler kaj Stalin), Nico Israel, profesoro de la angla ĉe Kolegio Hunter (pri James Joyce kaj Esperanto), kaj Ulrich Becker, eldonisto de Esperanto-libroj en Novjorko (pri eldonado en Esperanto). Pliaj informoj haveblas ĉe: [www.soroslectures.org](http://www.soroslectures.org).

## Esperanto ĉe la Monda Socia Forumo, Montrealo

**20 septembro 2016.** Kiam la Monda Socia Forumo renkontiĝis en Montrealo komence de aŭgusto – por sia unua renkontiĝo en la Nordo kaj la dekdua en la serio – esperantistoj aperis multnombre. La Forumo lanĉiĝis en Porto Alegre, Brazilo, en 2001, kaj en postaj jaroj renkontiĝis en Barato, Kenjo, Pakistano, Senegal, Tunizio kaj Venezuelo. Ĉirkaŭ 15.000 partoprenantoj aperis en Montrealo. La Forumon oni priskribas kiel "la plej granda renkontiĝo de civila socio cele al trovo de solvoj al la problemoj de nia nuna tempo."

Esperantistoj partoprenis la Marŝon de la Tero, starigis informan budon dum tri tagoj de la Forumo, kaj prezentis du prelegojn, en la angla kaj franca, pri Esperanto kaj ĝia graveco en la movado por socia reformo. La Esperanto-delegitaro estis multnacia kaj multlingva, prezentante la argumentojn por lerni Esperanton ne nur en la angla kaj franca sed ankaŭ en la hispana, portugala kaj japana. Multaj neesperantistaj partoprenantoj rimarkis, ke, dum la oficialaj Forumaj lingvoj estis la franca, angla kaj hispana, oni provizis interpretadon nur en la plej gravaj sesioj, kaj, ĉiukaze, parolantoj de aliaj lingvoj restis sen rimedoj. Kiel atentigis la esperantistoj, tia maljusta diskriminacio surbaze de lingvoj estas muklte tro ofta en tiaj aranĝoj – rezulto ne nur de manko de mono sed ankaŭ de manko de preteco fronti fundamentan komunikan problemon. Ili instigis la multnombrajn Forumanojn kiujn ili kontaktis, ke ili aliĝu al la retejo por lerni Esperanton, Lernu.net.

Universala Esperanto-Asocio kaj lokaj kaj regionaj Esperanto-organizaĵoj kunhelpis la Esperanto-agadon.

## Temo de la venontjara Universala Kongreso de Esperanto: Daŭripova turismo

Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 102-a Universala Kongreso de Esperanto traktos la temon "Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo". Tiun elekton inspiris la decido de Unuiĝintaj Nacioj (UN), nomi la jaron 2017 la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo.

"La nuntempa amasa turismo kreskis el ideoj kaj entreprenoj, kiuj formiĝis en la sama epoko kiel Esperanto," komentas Mark Fettes, la Prezidanto de UEA. "Ĝi havas grandan potencialon interproksimigi homojn, sed ĝi povas ankaŭ esti medi- kaj kultur-detrua. En tempo, kiam la mondo serĉas daŭripovajn solvojn por siaj problemoj, la ligiteco inter tutmonda komunikado kaj tutmonda vojaĝado fariĝis grava demando.

"Laŭ la statistiko de UN, preskaŭ dekono de ĉiuj laborpostenoj tutmonde rilatas al turismo. La signifo de tiu ekonomia sektoro 'estas ofte subtaksata,' laŭ la Ĝenerala Sekretario de la Monda Turisma Organizo, Taleb Rifai. Precipe en la ekonomie plej malfortaj landoj, la disvolvo de daŭripova turismo povus esti efika rimedo en la streboj por forigi akutan malriĉecon – la unua el la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), kiuj nun gvidas la laboron de UN. Ankaŭ ĉe aliaj el la CDE, ekzemple Celo 8, pri ekonomia evoluo, Celo 12, pri daŭripovaj konsumado kaj produktado, kaj Celo 14, pri protektado de la oceanoj, turismo starigas samtempe grandajn problemojn kaj grandajn ŝancojn.

En sia rezolucio proklamanta la Jaron, la Ĝenerala Asembleo de UN aparte substrekis la kulturen signifon de turismo "por nutri pli bonan interkompreniĝon inter la popoloj ĉie, por pligrandigi la konscion pri la riĉa heredaĵo de diversaj civilizacioj, kaj por disvolvi pli profundan aprezon de la propraj valoroj de diversaj kulturoj, tiel kontribuante al la plifortigo de paco en la mondo." Tiuj ideoj, tiel proksimaj al tiuj de la esperantistoj, substrekas la valoron de pli vasta kleriĝado, diskutado kaj agado pri daŭripova turismo — ne nur en la 102-a UK mem, sed ankaŭ en pli longa perspektivo.

"Nia movado konsistas el homoj scivolemaj pri aliaj landoj kaj kulturoj, kiuj volas renkonti la lokanojn en rilatoj de egaleco," klarigas Fettes. "Tio estas jam valorega kontribuo al la koncepto pri daŭripova turismo. Ni povus tamen fari multe pli por disvolvi la edukon kaj medikonscian flankojn de la turismo en Esperanto. Mi esperas, ke la kongreso en Seulo helpos inspiri novajn ideojn kaj novajn iniciatojn sur tiu kampo."

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.*

*212-687-7041*

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041